

## & La bona trinkaĵo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 465 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

### (#Melodio:

<1,5:31> (

/mi mi dore mi mimi mimido re fa;fa mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mi3re doTi La; So3mi mimi re do)

)×15 )+

### (&Strofoj:

'1 /Vojaĝis en unu kupeo fervoja ; Kvar viroj kun bona humoro plenĝoja.

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen' ; Dancu nun trankvile.**)

'2 Dum unu el ili subite eliris, ; La dua botelon el kofro eltiris, .....

'3 Kaj ĉiu el ili kun bona humoro ; Trinketis glaseton de iu likvoro. ....

'4 Kaj dum la tri viroj drinketis kaj ĝuis, ; Jen io flaveta de supre gut-fluis. ....

'5 Ĉi supre ja staris la korbo de Pleton, ; De ĵus foririnta la kvara sinjoro! .....

'6 Ĉu eble enhavas ĝi vinboteleton? ; Ĉu eble enestas do ankaŭ likvoro? .....

'7 Kaj ĉiu do sian glaseton eklevis, ; La gutoj en glasojn do fali nun devis. ....

'8 Kaj ili gustumis la gutojn avide, ; Por sperti ilian aromon rapide. ....

'9 Kaj diris unue sinjoro Rabaja: ; "Jen estas ja vere do vino Tokaja!" .....

'10 Sed tuj nun protestis sinjoro Ĉambrako: ; "Ĝi estas tre forta kaj bona konjako!" .....

'11 Kaj laste do diris sinjoro Murano: ; "Stultuloj! Ĝi estas ja bona ĉampano!" .....

'12 Dum ili la glasojn do plu ekzamenis, ; La kvara sinjoro denove envenis. ....

'13 Kaj ili do diris al li nun scivole: ; "Ho, solvu la gravan enigmon bonvole: .....

'14 Ni ĉiuj cerbumas, sed ne ĝin divenas, ; Jen kion do via korbeto entenas." .....

'15 Afable al ili respondis nun Pleton: ; "Nur ion malgravan: Malgrandan hundeton!" .....